

Apr.

MARCH 1941 MARCH

U Nur rekte, kuraĝe
N Kaj ne flankigante
U Ni iru la vojon celitan;
E Eo guto malgranda
C Konstanta frapante
O Traboras la monton granitan.

L'espero, l'obstino
kaj la pacienco,-
Jen estas la signoj
per kies potenco
Ni paŝo post paŝo
post longa laboro
Atingos la celon
EN GLORO.

AMERICAN ESPERANTIST
Vol. 55
AMERIKA
ESPERANTISTO

LA MONATA BULTENO DE LA ESPERANTA-ASOCIO DE NORDA AMERIKA
Joseph Leahy, General Secretary
1410 H Street, N.W., Washington, D.C.
Central Office
J. H. Scherer, Pres., Los Angeles, Calif. -- E. G. Dodge, Ch. Exec. Comm., Wash. D.C.

ESTAS FORTO

UNUECO ESTAS FORTO



Number 7 * * \$1. Per Year--Anywhere * * 10c per copy * * April 1941

PREPARU VIN POR OKLAHOMA CITY!

APRIL 20-26 INTERNATIONAL APRIL 20-26



ESPERANTO WEEK

ESPERANTO WEEK IS ALMOST HERE

WHAT HAVE YOU DONE FOR IT?

WHAT ARE YOU DOING FOR IT? Act quickly, increase your effort, and help to put this over in a big way. This covers all of North and South America. The Brazil and Argentina Esperanto-Associations have joined in adopting "Esperanto Week" and are urging their members to extra activities for the week. Get a supply of Posters and find as many as possible. Here's your chance to become a Patrono or Subtenanto without any cost.-See Feb. issue. GO AFTER THEM.

IT IS NOT TOO LATE, BUT ACT NOW.

Also see page Six

EN KUNA LABORADO ELVENOS FORTO!

POTENTIAL LEADERS. We are often asked "Why, with so many Esperanto classes in operation are so few of them members of EANA?"

One lady who has taught many classes writes "I suppose it seems odd to you that though I have taught many, so few become members of the association. The reason is that almost 100% of my pupils have been 8th grade and High School students, with lots of enthusiasm, but little money."

New devotees to the Esperanto movement are being made, and though not yet able to help in a material way, they are spreading the Esperanto idea.-THE COMING LEADERS.

E A N A Congress, July 4,5,6.

OKLAHOMA CITY VOKAS VIN

OKLAHOMA BILTMORE

venu al OKLAHOMA CITY-1941.

LA ESPERANTISTOJ DE OKLAHOMA CITY CIUJ ATENDAS VIN BRAKOMALFERME. NE MALKONTENTIGAS ILIN.

ONLY THREE MONTHS until the Oklahomans will be entertaining the E A N A and there is not a shadow of a doubt but that it will be a delightful revelation. Committees are leaving nothing to chance--even building up classes in nearby towns to make sure they will have a "full house" regardless. Miss Bernice Rayburn, President of the Esp-Ass'n of Okla. City has formed classes in Blackwell, Kingfisher, Ada, etc., and they will help the City entertain the visitors. Miss Clara Harrison is busy recording the applications for tickets; Mr. Hunter counting the incoming money (hope he needs help) and Mrs. Bainbridge making reservations--send your \$3 dollars to her for Congress tickets, and ask her to make reservations in the Oklahoma-Biltmore--single rooms \$2.50, double \$3.50. Do not neglect it for even a minute. Get busy, order now.

A POETRY CONTEST FOR NEW TALENT ONLY.

It is now two and a half years since Amerika Esperantisto announced a contest in the translation of poetry into Esperanto verse. New talent may have developed since then. In the contest of 1938 three poems were used, and the following samideanoj received either a first prize or a second prize or honorable mention for some of their work:

- Arthur E. Regal of Chicago.
- George J. Falgier of Winchester, Ill.
- George A. Connor of New York City.
- George Irving Savage of Arlington, Mass.
- Thomas A. Goldman of Washington, D.C.
- Conrad Fisher of Meadville, Pa.

We have now decided to conduct a further contest but along a different line. Its purpose is to encourage others to try their wings, who never before have taken a successful ride on old Pegasus — at least not in public. Hence the above named winners in the 1938 competition will not be accepted as competitors this time. This will insure an open field to all new comers. Fair enough, don't you think? Naturally the members of the board of judges will refrain from competing, but all other readers are invited to try their abilities in this way. Even if not adjudged worthy of an award, the effort should be a pleasure and a self-education.

The poem selected for translation is by Henry Van Dyke, "America for me," and it was written a few years before the first great war. In translating it, you may refer to our native land either as "Ameriko" or as "Usono." Try to follow the meter of the original as accurately as is practicable; but in case you decide to add an extra unaccented syllable at the end of all lines, or at the end of half of the lines, this is permissible.

Vidu paĝo 3

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO.

Early in March our office received both of the current publications of IEL, that is, the January-February number of ESPERANTO INTERNACIA, from the headquarters in England, and a two-page December bulletin sent out by the Vice-President of IEL, S-ro E. Malmgren, whose full address now is "IEL, Tegelbacken, Stockholm, Sweden." He asks that Esperantist news from all countries be sent to him, so that he may better serve the samideanoj in all countries with information. In our present issue we reproduce part of S-ano Malmgren's bulletin, since it lifts the veil of silence that so deeply covers continental Europe, and permits the good cheer of still active Esperanto loyalty to come through to us in little flashes.

One encouraging item, also taken from the bulteno, is that there came fresh from the press, as recently as August, 1940, a new Esperanto book published in unoccupied France. This was a translation of "Kleraj Virinoj," by Moliere. A welcome proof is this, that not even the present terrible conditions of war can keep Esperanto literature from growing. Verily -- "Esperanto ja vivas -- kaj vivos!"

From the magazine, Esperanto Internacia, we learn with sincere satisfaction that the Internacia Esperanto-Ligo was able to close its books for 1940 without a deficit. But this has been accomplished only by drastic retrenchment and economy. For inevitably the war has cut off membership and payments of dues in so great an area of Europe. The very hard working Secretary of IEL, S-rp C.C.Goldsmith, is now shouldering all the work of the office by himself. Every Esperantist who takes seriously the cause for which "la Verda Stelo" stands as the symbol, should loyally uphold IEL in this most trying period, by becoming or remaining an active member.

IEL membership is \$1.00 for Jarlibro alone, or \$2.00 with Esperanto Internacia. A rebate of 25¢ when payment of EANA membership dues is made at the same time. This: \$2.75 for EANA plus Jarlibro; \$3.75 when Esperanto Internacia is included.

PRESIDENT SCHERER SILENT TEN DAYS. Could anything be more serious? Can you imagine any thing more devastatingly appalling, unheard of, than an insurance man being unable to talk-even for a few minutes? Just try to picture the mental (with physical added) suffering of our beloved president who was recently detached from his tonsils and had to remain in bed--silently--ten days. We are happy to announce full recovery and Joseph is himself again. Gratulojn.

Rules of the Competition.-(Continued)

1. Be careful to polish and re-polish your work before sending it in. Watch carefully, not merely to avoid errors, but to surmount difficulties in the rendition, in the most effective ways. Do not expect that you can render every line literally, word for word; but feel in your heart the artistic purpose of the author, and reproduce that in Esperanto as effectively as you can.

2. Your translation must be received at the EANA office, 1410 H-St., N.W., Washington, D.C., not later than the last day of May, 1941. This gives abundance of time to perfect your work, to the very best of your ability.

3. Send an original and two carbon copies, as there will be three judges in different cities.

4. Your translation is to be sent anonymously. Be careful to exclude your real name not merely from the manuscript, but from the envelope and all contents. For purpose of identification, sign your manuscript with some pen-name; then remember to send also, in a small sealed envelope a slip of paper showing both your pen-name and your true name, with address.

5. Indicate on your manuscript whether you are competing in Class A or in Class B. Class A is for those who began their learning of Esperanto in 1938, or later. And Class B is for Esperantists of longer standing.

A first and a second award will be made in each of the two classes, A and B. But the judges reserve the right to withhold awards if versions of adequate merit should not be supplied. No cash prizes are offered; but a small assortment of Esperanto booklets will be sent as a token to each winner of an award.

Now turn to and read AMERICA FOR ME. It will test your mettle, when you come to translate it. We could have selected something easier -- but we didn't! The effort is worth any Esperantist's while.

AMERICA FOR ME.

By Henry Van Dyke,

(Tekso uzota por la nuna konkurso, en poezia tradukado.)

'Tis fine to see the Old World, and travel up and down
Among the famous palaces and cities of renown,
To admire the crumbly castles and the statues of the kings --
But now I think I've had enough of antiquated things.

So it's home again, and home again, America for me!
My heart is turning home again, and there I long to be,
In the land of youth and freedom beyond the ocean bars,
Where the air is full of sunlight and the flag is full of stars.

Oh, London is a man's town, there's power in the air;
And Paris is a woman's town, with flowers in her hair;
And it's sweet to dream in Venice, and it's great to study Rome;
But when it comes to living, there is no place like home.

I like the German fir-woods, in green battalions drilled;
I like the gardens of Versailles with flashing fountains filled;
But, oh, to take your hand, my dear, and ramble for a day
In the friendly western woodland where Nature has her way!

I know that Europe's wonderful, yet something seems to lack:
The Past is too much with her, and the people looking back.
But the glory of the Present is to make the Future free --
We love our land for what she is and what she is to be.

Oh, it's home again, and home again, America for me!
I want a ship that's western bound to plough the rolling sea,
To the blessed Land of Room Enough beyond the ocean bars,
Where the air is full of sunlight and the flag is full of stars.

L I D J A Z A M E N H O F

La plej juna filino de nia Majstro estis Lidja, naskita en la 29 de Januaro 1904. Ŝi lernis Esperanton kiam ŝi estis naŭjara knabino kaj uzadis nian lingvon en bela, flua, natura stilo, kian preskaŭ neniu alia en la mondo posedis.

En 1925 ŝi finis en la Universitato sian superan kurson de juro kaj de tiam vivadis kaj laboradis nur por Esperanto kaj Bahaismo. En Nederlando ŝi fariĝis instruistino laŭ la Cseh-metodo kaj vizitis diversajn eŭropajn landojn instruante kaj propagandante por la lingvo kaj por la metodo de Pastro Andreo Cseh. Ŝi venis en Usonon kaj restis dum longa tempo en la lando, ĉiam vizitante diversajn urbojn kaj organizante kursojn de Esperanto laŭ la Cseh-metodo.

Ŝi tradukis diversajn rimarkindajn kaj ampleksajn verkojn de la pola lingvo en Esperanton: «Quo vadis?», de Sienkiewicz, «Iridion», de Krasinski, «Parizaj Paroladoj de Abdul Baha» kaj «Baha, u'llah kaj la Nova Epoko», de Esslemont, kaj verkis originale rimarkindan libron, kies titolo estas: «Homo, Dio, Profeto».

Tiu genia, agema, brila junulino mortis en malliberejo, kvazaŭ ŝi estus krimulino! Ŝia Patrujo falis en la manojn de la malamikoj kaj ĉiuj rimarkindaj poloj estis enkarcerigitaj... Pri ŝia morto, la grava tagjurnalo «Correio da Manhã», en la 4-1-1941, sub la titolo «UNU EL LA VIKTIMOJ», aperigis brilan noton de la Redakcio, kiun ni tradukas tie ĉi. Jen, kion diris «Correio da Manhã»:

UNU EL LA VIKTIMOJ

Iam aperis homo, kiu pensis, ke li povis kunlabori por la bono de la homaro, uzante kun tia celo sian grandan kulturon de filologo kaj poŝtulo. Li opiniis tiel prave, ke se la popoloj de sur la Tero povus pli bone sin interkompreni, ili pli bone alproksimiĝus unuj de la aliaj, kondiĉe ke ili povus senpene interŝanĝi ideojn per komuna lingvo facila, komprenebla, esprimorika, per kiu ili nuligus la konfuzon de la Babela Turo — unu el la malbenoj lastitaj al la homo pro lia tro granda ambicio. Tiu revanto estis nomata sur la Tero Lazaro Ludoviko Zamenhof, la kreinto de Esperanto, kiu varbis adeptojn kaj estas faranta rimarkindajn servojn al la interkomunikadoj, kvankam ĝi ne tute plene atingis la celon dezirantan, ĉar tia ne estis la intereso de tiuj homoj, kiuj ĉiam vivadas el la miskomprenoj inter la nacioj. Malgraŭ tio, la elpensinto lasis sian nomon envolvitan en tre meritita gloro kaj tre prave estis enskribita en la



rango de tiuj, «kiu ne pasis tra la vivo en blanka nubo». (1)

Kiel filologo, konvinkita ke la gramatika difino de la vorto kiel manifestigo de la penso estas tute vera, ŝi ne povis kredi, ke la vero estas en la cinika frazo de Talleyrand (2). Sed efektive, same kiel antaŭ, dum kaj post la epoko de la fama franca Statisto, en la antikvaj pretekstoj same kiel en la nuntempaj, en la intrigoj de l' pratempo aŭ en la telegramo de Ems, aŭ en la nuntempaj «protektaj invadoj de landoj», oni ne uzadas la vorton por ali celo ol por kaŝi la penson.

En tia medio, kiu neniam ŝanĝiĝis, Zamenhof ne povis vidi la triumfon de sia ideo. Mortante, li lasis la mondon ĉiam en agitado, ĉiam sen interkompreno. La militoj sekvis unu alian kaj li ne konstatis la finon de la antaŭlasta, kiu el la servuteco reaperigis lian Pollandon, nek — memkompreneble — la nunan, kiu refaliĝis ĝin dumtempe en la manojn de l' antikvaj sklavigantoj.

Li lasis sur nia planedo Esperanton, kaj por helpi ĝian disvastigon, Fraŭlino Lidja Zamenhof. La idiomo daŭre rompas malhelpaĵojn. La filino, neniu scias pro kiu alia krimo krom esti polino, posedis kulturon kaj devoni de eminenta patro, mortis antaŭ kelkaj tagoj, kiel viktimo de suferoj kaj malsato, en malliberejo de krimuloj, en la glora kaj martira urbo Varsovio.

Kompreneble ni ne tute plene kunsentas kun la pesimismo de la redaktoro de «Correio da Manhã». Ne ĉiuj homoj estas Talleyrandoj. Ekzistas ankaŭ bonuloj, kvankam ne multenombraj, kaj Lidja Zamenhof same kiel ŝia patro estas brila

specimenoj de bonuloj, kies nomojn la homaro neniam forgesos. Ŝiaj verkoj restos eterne sua la tero.

(1) Fama brazila verso por difini homan vivon plenan je sufero, sed vere utila. — Tradukinto.

(2) «La vortoj estas kreitaj por kaŝi la penson». — Tradukinto.

(El «Pernambuco Esperantista»)

The latest news direct from Lydia was a letter to S-ro Hans Jacob, Geneva, dated Warsaw Dec 3rd 1940. No mention of imprisonment. Said her aunt (Helene, widow of Felix Zamenhof) died the week previously, of grippe. The date of this letter and the date of the Brazilian paper would indicate that if the article is correct, her death occurred between Dec. 3 1940 and Jan. 4 1941. We are still sincerely hoping that when the dense veil of secrecy which has enveloped Poland for several months is lifted we will be cheered by better news.

VERD*STELA GEFRATARO.

Refoje ni direktas atenton al la anonco ke S-ro Frank A. Post (kies adreso estas Box 447, RFD 5, Little Rock Ark.) estas Direktoro de «VoSoGo.» Do ĉiu, kiu deziras interkorespondon inter kvino da nordamerikaj gesamideanoj, bonvolu skribi al li pri via preteco korespondi kiel membro de tia kvino. Ĉiu funkcianta kvino estas unu «Stelo.» Pri la nomoj en Steloj unua kaj dua ni ne ricevis informon. Sed Stelo #3 enhavas la jenajn membrojn: O. Collier, Chicago; T. Goldman, Washington; J. Lido, Brooklyn; L. Stern, Cleveland; W. Vathis, Bethlehem, Pa. Ili vigligas interkonitecon kaj amikecon per rondiranta letero, kaj rikoltas multe da ĝuo tiamaniere.

DON'T FORGET OKLAHOMA CITY.

OBITUARY



HENRY W. HETZEL 1873-1941

Prezidanto de EANA 1925 ĝis 1935.

Again the Reaper has taken from among us one of the well-loved "elder statesmen" of the Esperanto movement in our country. Henry W. Hetzel, formerly an instructor in the school system of Philadelphia, has recently succumbed at the age of 68 to a heart ailment and other complications which for a long time had forced him to conserve his strength and slacken his activities. Mr. Hetzel was President of EANA ten years from 1925-1935, when he asked to be relieved of further service, and became by vote of EANA at the New York congress of 1935 "Honorary President". Twice since then he has been chosen to serve as pro tempore presiding officer of a congress of EANA. He was in attendance at six World Congresses of Esperanto, the latest being the Jubilee Congress of 1937 at Warsaw, Poland. Also he was a member for EANA of the governing Komitato of the Internacia Esperanto-Ligo. His unflinching good humor and friendliness were an influence at Esperanto gatherings which will long be well remembered and very sincerely missed.

The only details of his passing came to us after the March "AE" had been mailed. Mr. Hugh Rouse of the Esperanto Society of Phil'a informed us that Mr. Hetzel had passed away on February 8th. The Esperanto Society had sent a large floral Esperanto Star. Burial was private. To his family--Wife and Daughter--is extended the heartfelt sympathy of Esperantists in all parts of the world. LI REPOZU EN PACO.

THE YOUNG MUST TAKE THEIR PLACES



A letter from Mr. Fred H. McMann, Chairman of the Finance Committee of EANA, makes mention of a significant fact which doubtless has occurred to many of our members, but which will bear reemphasizing. Among those workers for Esperanto in the United States who do not stop with merely keeping alive their membership in the national organization and in local clubs but who



are glad to do "more than their share", both in labors and in financial support, there have arisen, indeed, in recent years an encouraging number who are young or in early middle life. But there is another side. Many of the real pillars of the movement have been, until now, men and women far along in years. Death has spared some of these into their seventies, some into their eighties, and one (Edward S. Payson) remained fruitfully active even into his nineties. But since 1937 our losses in the upper age-brackets have been significantly severe. Without attempting to mention all who were worthily loyal to the movement, it is not invidious to pay special tribute to the services rendered, clear into advanced age, by Rev. John Fazel of Kansas and Texas, by Dr. Tobias Sigel of Detroit, by Henry W. Fisher of New Jersey and Florida, by John C. Bley, of Chicago, by Fred Hamann of Milwaukee, by Rev. Samuel C. Eby of New York, Joseph S. Taylor of Haverford, Pa., by H. B. Hastings of Washington and Boston, and by Henry W. Hetzel of Philadelphia. The combined contributions of these men have been so large a factor in whatever of stability and success the movement in Usono may have had, that a true picture of what would have been the course of Esperanto affairs without their loyal labors cannot be drawn. The mention of their names is not merely an affectionate tribute to their memory. More especially it is a reminder to all the loyal Esperantists in our land who are now young, or in the prime of early middle life, that upon them must rest the happy responsibility for taking over the movement from the elder hands who can guide it no longer. Among them must arise the many (and may it be a "many"!) who in old age some few decades hence will be entitled to feel that they have been true successors, in zeal and generosity and leadership and good judgement, to the previous generation of pioneer workers in our Esperanto movement.

SE VIA MEMBROKOTIZO DEVAS ESTI PAGATA NUN AŬ BALDAŬ

VI TROVAS KOLORAN KRUCON APUD VIA NOMO SUR LA KOVERTO

Dollar marks? Yes, we may call an organization by any sweet, uncommercial sounding name but it still requires dollars to maintain it, and EANA is depending in large part for its support on the generosity of those contributing above the regular membership rates. **HERE IS THE HONOR ROLL 1940-1941 MEMBERS--PATRONOJ kaj SUBTENANTOJ. VIVU!!!**

Esperanto Society of Detroit, Mich., Robert L. Davis, Detroit, Michigan, G.P. Ferree, Chenoa, Ill., Mrs Clara J. Zwerzina, Mt. Clemens, Mich., Mrs. Luella K. Beecher, Lima, Ohio Dr. Lydia A. DeVilbiss, Miami, Florida, Dr. Cecil Stockard, Bradenton, Florida, Miss Roan U. Orloff, Boston, Mass., Mr. A. S. Mellichamp, Peoria, Ill., Mr. Fritz Mitschke, Paterson, N.J., Mr. Francis T. Dwyer, Sacramento, Calif., Mrs. Windsor H. Wyman, No. Abington, Mass., Miss Grace Randolph, Greenville, R.I., Mr. James F. Morton, Paterson, N.J., One Anonymous, Mr. Louis Dormont, Brooklyn, N.Y., Mr. Fred H. McMann, Troy, N.Y., Dr. Fred G. Cottrell, Washington, D.C., Mr. William Plampin, Washington, D.C., Mr. E. G. Dodge, Washington, D.C. This list contains the names (most of them) of people who have been consistent supporters year after year, with their money and labor for the movement. ALL HONOR TO THEM

Students Form Esperanto Club

Students who have been enrolled in the Esperanto classes this winter under the instruction of Mrs. Paul Nuss, organized a club Monday evening at a meeting at the YWCA.

Mrs. Nuss was chosen club adviser and George A. Conner of New York City, Esperanto Consul, honorary president. Other officers are: Mrs. Charles N. Fee, president; Mrs. J. G. Brundin, vice president; C. M. McKay, secretary; Annabelle Williamson, treasurer; Arthur Watson, corresponding secretary; and Mrs. Andrew L. Freeman, publicity chairman.

Mrs. Ivan Person, Miss Marie Mynster, Mrs. J. S. Mayer and Mrs. C. J. Shannahan were appointed on the membership committee, with Mrs. Eugene Richter, Mrs. C. W. Crossman, Mrs. Marie Nevin and Mrs. Clifton McIntyre, on the program committee.

The club will meet at 8 P.M. Monday with alternate meetings at the YWCA and the home of Mrs. Brundin, 110 Eighth avenue South. Anyone who has studied Esperanto is invited to join the group.

The purpose of the group will be the practical application of Esperanto in conversation, recital, song, drama and foreign correspondence. Eligible for membership are those who have completed the 12-hour class or who have studied the "Esperanto Home Student," or its equivalent.



Photo by Lee Studio. MRS. PAUL NUSS

New Esperanto Class Organized

Because of added interest in Esperanto, the YWCA, which has sponsored several classes, will start another group this month under the direction of Mrs. Paul Nuss. Both men and women are invited to join the class which will meet Tuesday evenings at the YMCA. Registration may be made by telephoning the YWCA and the first meeting is set for February 25. The only charge in connection with the class is the fee to cover the expense of the text. Members will be eligible to membership in the Esperanto club which is being organized.

We have "clippings" enough--from N. Dak. papers--to fill all our pages; the one at the left shows the subject of them, from the Grand Forks "Herald" 3-6-'41. "Dakota Esperanto-Pioneer" is the name of a new club, organized from the classes of Mrs. Rita Beukema Nuss, our fervorolino in that outpost of Esperantolando. Mrs. Nuss is truly a pioneer in the best sense of the word, having formed several classes in that city--and all going strong. We note that George A. Connor, "Esperanto Consul" from New York was elected honorary president of the new club, in recognition of his assistance in getting Esperanto started out there, by radio and news stories, last summer. Since then Mrs. Nuss has made wonderful progress with classes in Y M C A., Y W C A., and Ass'n of University Women, all cooperating, under Mrs. Nuss guidance. One of the members of the Univ. Women's group, Mrs. Borden, visited New York recently, and called upon Mr. Connor, with a report of progress of the grand Esperanto activities in Grand Forks. Our sincere congratulations to Mrs. Nuss for the splendid work she is doing for Nia Afero, and our best wishes to the fine list of officers of the new club. We are looking forward to seeing a photo of the group at an early date. Bravo! al vi, S-ino Nuss.

Parolas la majstro

(Parolado Guildhall 1907.)
Longe daŭros ankoraŭ malluma nokto sur la tero, sed ne eterne ĝi daŭros. Venos iam la tempo, kiam la homoj ĉesos esti lupoj unuj kontraŭ aliaj.

A DATE THAT PLAYS "HIDE AND SEEK". A second "Tutamerika Numero" of Amerika Esperantisto combined with other New World organs is most surely under preparation. We know that the manuscript for the part furnished by EANA has reached Rio de Janeiro. We told our membership last month to expect the "Tutamerika" as their May issue of "AE". Recent information raises a doubt whether this will arrive in time for May--or may be postponed until June. In either case there will be two numbers between this issue and the Congress No.

ESPERANTO NEWS FROM EUROPE.

Again we are able to thank Internacia Esperanto-Ligo for items of news which — even if sometimes a little delayed — is otherwise unobtainable, about the activities of Esperantists on the European continent. That now their difficulties are enormous, due to war conditions and to the unfriendliness of the present German regime, is most easily understood. It is a source for deep congratulation that the loyal ones "over there" are still able to "carry on" in the degree shown in our reprint below, taken from the recently received December bulletin issued by E. Malmgren, Vice-President of IEL, in Stockholm, Sweden.

Novajoj.

Finnlando. Pluraj finnaj samideanoj sendis afablajn leterojn pro la oktobra Bulteno de IEL, kiun ili trovis kuraĝiga kaj kiel freŝa vento el la tutmonda samideanaro. Montriĝas, ke diversloke oni denove komencis esperanto-kursojn. En oktobro la finnaj fervojistoj eĉ eldonis novan propagando-folion "La plej bona lingva helpo de la turistoj". — Jen novaj pruvoj pri la persistemo kaj ankaŭ idealismo de la herooj finna popolo!

Germanujo. Per presita cirkulero prof. Christaller, Stuttgart, en Esperanta kaj germana lingvoj dankas la esperantistojn pro bondeziroj okaze de lia 80-jara nasktago la 21 aŭg. Li ankaŭ informas, ke en aprilo lia dekstra okulo tute difektigis pro akcidento. Sed per la maldekstra okulo li povas kontentige servi sin. Li finas sian cirkulieron per la vortoj: "Ni laboru kaj esperu!" — Honoron al prof. Christaller!

Grekujo. La nov.—dec. numero de "Helena Esperantisto" informas pri la sukcesa Helena Esperanto-kongreso dum la somero en Paleon Faliron apud Ateno. Regis granda entuziasmo inter la multnombraj ĉeestintoj. Oni raportis pri diversaj kursoj kaj pri multaj plenumitaj ekzamenoj.

Hispanujo. Ankaŭ en tiu lando, kiu tiom longe suferis de la interna milito, la esperantistoj denove komencis propagandi kaj kursoj. Ili denove kunvenas en kelkaj kluboj, kaj ili estas esperplenaj pri la estonteco. — Kuraĝe antaŭen!

Hungarujo. Multaj hungaroj afable skribis al ni pri la Esperanto-movado en Hungarujo. Oni penadas labori kiel kutime, sed kompreneble trovas multajn malfacilaĵojn. Interesa estas sciigo de s-ro Paul Balkányi, ke Esperanto-kolono aperas en kelkaj hungaraj revuoj, kaj ke la radiaj dissendoj el Budapeŝto estas daŭre aŭskulteblaj lunde kaj ĵaŭde vespere je 20.15. Ĉar lastatempe el la eksterlando venis tre malmultaj dank-skribaĵoj, la hungaraj esperantistoj nun sin turnas al ĉiuj esperantistoj, ke ili sendu dankon al la radio-stacio. Necesegas!

Italujo. Laŭ sciigo de pluraj italaj samideanoj oni kelkloke denove komencis Esperantoagadon. Komenciĝis eĉ grandaj kursoj en Torino kaj Pisa!

Jugoslavio. D-ro Lapenna, estrarano de IEL, sendis al ni afablan leteron kune kun plej interesa komunikilo pri la esperantista agado en Jugoslavio. En junio la Jugoslavia ligo havis konferencon de la plej eminentaj reprezentantoj el ĉiuj socioj de la lando. La sekvo de tiu konferenco estis grandstila propagando dum septembro. Oni aperigis en la gazetaro multajn artikolojn pri Esperanto, oni aranĝis prelegojn kaj oni eĉ eldonis apartan broŝuron de d-ro Lapenna sub la titolo: "Angla aŭ Esperanto" Disvendiĝis la tuta eldonkvanto, 3.000

ekz. En oktobro komenciĝis novaj Esperanto-kursoj en la tuta lando. Entute ĉ. 400 komencantoj! Kaj la Esperantosocietoj kunvenas kiel kutime. Cetere aperis antaŭ mallonga tempo en Jugoslavio grava verko de la konata sciencisto d-ro Zivkovic sub la titolo "La deveno de la homo" kun granda resumo en Esperanto.

D-ro Lapenna rimas sian raporton per la jenaj frazoj: "Kvankam ni provizore estas disigitaj de niaj geamikoj en la aliaj landoj, ni sentas ilian proksimon kaj la varmecen de ina koro, kiu batas por la sama idealo kiel ankaŭ la nia. Persiste antaŭen! La estoateco apartenas al ni!" Ne estas mirinde, ke niaj jugoslavaj amikoj fiere konstatas, ke ilia Esperanto-movado kontentige evoluigas! IEL ankaŭ fieras pri ili, kaj sincere gratulas!

Nederlando. El la junia numero de "La Praktiko" ni informas, ke tiu revuo intencas se eble daŭrigi sian mision. La Esperanto-domo en Arnheim ne povas funkcii, ĉar aligis al la someraj kursoj nur c. 20 personoj. La Praktiko konstatas, ke la Esperanto-organizaĵoj en Nederlando rajtas uĉere daŭrigi sian agadon. La kluboj kunvenas kiel antaŭe, sed kompreneble malpli vigle. "La Praktiko" diras: "Kia ajn estos la aspekto de la postmilita mondo, certe estas tio, ke granda kaj kreskanta estos la bezono al neŭtrala internacia lingvo. Do ni, esperantistoj, povos kaj devos daŭrigi nian bean kaj utilan agadon."

Skribis al ni red. Teo Jung. Li informas, ke dum bombardado de Rotterdam bedaurinde mortis unu samideano de la katolika grupo. Aliaj samideanoj pro la bombardado perdis sian tutan havaĵon; Esperanto-amikoj fratece liveris helpon! Cetere ankaŭ la Esperanto-biblioteko de Rotterdam estis trafita de bombo kaj tute detruita. Amiko Jung faris grandstilan donacon por restarigi la bibliotekon. S-ro Jung finas sian novembran leteron per la vortoj: "Se vi skribas al s-ro Goldsmith aŭ al aliaj amikoj kaj konatoj, ne forgesu transdoni miajn plej korajn salutojn kaj bondezirojn por la estonteco."

Norvegujo. Niaj norvegaj amikoj raportas, ke ili jarkunvenis la 1—3 nov. en Oslo. Partoprenis 1/3 de la landaj kluboj, kaj estis reprezentitaj i. a. ankaŭ la urboj Narvik!, Trondheim kaj Bergen! Mirinde! En la jarkunveno oni raportis pri diversaj novaj Esperanto-kursoj. Speciale interese estas, ke oni komencis Esperanto-kursojn por geknaboj, kruj ne povas viziti la lernejojn, ĉar tiuj estas okupitaj por aliaj ceoj. Amiko Arnfinn Jensen finas sian raporton per la konkludo: "La kunveno donis al ni novan kuraĝon. Ni daŭrigos labori tiom, kiom ni povos."

La Norvega Ligo petas nin komuniki al la eksterlandaj Esperanto-gazetoj, ke tiuj bonvolu konservi por la Norvega Ligo kompletajn jarkolektojn. Kiam la poŝtaj rilatoj denove regule funkcios, la ligo danke akceptos la jarkolektojn kaj rekompence la norvegoj sendos la kompletan jarkolekton de la "Norvega esperantisto".

Portugalujo. Nia fervora ĉefdelegito S. Carreira en Lisboa raportas pri sukcesa laboro de li kaj de liaj kunlaborantoj. Aperas Esperanto-kolono kaj kurso en kelkaj gazetoj. Perkoresponda kurso sub gvidado de samideano Roberto das Neves. Aliaj kursoj por komencantoj. Amiko Carreira estas plena je fido kaj energio: "Mi ne pasigas tagon sen meti brikon por la pligrandigo de nia falango."

Per tiaj batalantoj ni konkeros la mondon!

Svisujo. Atingis nin la doloriga sciigo, ke mortis en oktobro s-ro E. Stettler, la honora prez. de UEA. Cefdel. O. Walder kaj uel. E. Müller informis nin, ke niaj svisaj samideanoj lastatempe denove regule kunvenas en siaj kluboj. Kursojn oni ŝajne ne entreprenis, sed oni opinias, ke la tereno estos tre taŭga por Esperanto tuj post la milito.

Svedujo. La penadoj kolekti monon por dungi profesion sindikon progresas. Kolektiĝis ĝis nun sume 6.000 sved. kr. por la tempo 1940—1942.

La Sveda Esperanto-Instituto decidis tutlandan kampanjon por pli ĝenerala trapaso de la Esperanto-ekzameno. Tiel plialtiĝos la kvalito de la esperantistoj. Kaj tiel kreigos taŭga bazo por publika agado je la fino de la milito. La instituto pretiĝis oficialan insignojn el arĝento kaj bronzo por tiuj, kiuj trapasis la ekzamenon.